Votre revue de l'Association Pour l'Espéranto

N° 1 - 2017

# Espéranto en Marche

ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO
APE
ASOCIO POR ESPERANTO

**UNIVERSALA KONGRESO DE UEA EN SEULO : 22-29 JULIO 2017**

## LASTA MEMORIGO !

**Se via ĉi-supra stelo estas ruĝa,……...**

**NE FORGESU REKOTIZI AL APE POR 2017 !**

**Vi povas pagi al la konto BE72 000 3258537 16, pere de la kunmetita ĝirilo !**
**(MEM : 10 € FAM : 3 € BUL : 7 €)**


## *Enhavo*

Paĝo 2 : Kunvokilo al la Ĝ. A. de BEF en Bruselo (
Paĝo 3-4-5 : Protokolo de la pasinta Ĝ. A. de BEF en LOVERVAL.
Paĝo 6 : Ni gaje kantu !
Paĝo 7-8-9 : Germain Pirlot informas pri ILEI.
Paĝo 10 : PEKO 2017 (24-a ĝis 26a de marto 2017 en AMOUGIES).
Paĝo 11 : Elementaj principoj de militista propagando (A. Morelli).
Paĝo 12 : Prépositions.
Paĝo 13 : Aktivuloj informas pri Esperanto en regionaj gazetoj.
Paĝo 14 : Informoj pri Esperanto.
Paĝo 15 : Informoj pri Esperanto en Valonio.
Paĝo 16 : Kotizoj 2017 por APE kaj UEA. Abono al Eo-Info.

*************************************************

**Editeur responsable: Claude Glady**
**Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE BELGIO**
**00-32-(0)71/64 49 16 cglady@arcadis.be**

# BELGA ESPERANTO FEDERACIO (BEF)




Fédération Belge d'Esperanto
Belgische Espererantofederatie

BELGA ESPERANTO FEDERACIO

Defakta Asocio aliĝinta al UEA
Ĉe la sekretario : Claude Glady
Rue du Culot,1 -
B-5630 CERFONTAINE
0032-(0)71-64491
cglady@arcadis.be


## La Ĝenerala Asembleo de BEF okazos en BRUSELO
## Sabaton, la 18-an de marto 2017, je 13h30
## en salono Casablanca (2a etaĝo)
## De Pianofabriek Rue du Fort 35 Fortstraat
## 1060 Bruselo (Saint-Gilles/Sint-Gillis)

**TAGORDO :**

1) **Enkondukaj vortoj de la prezidantino kaj de la vicprezidanto.**
2) **Organizado de la Protokolo kaj de la listo de ĉeestantoj.**
3) **Aprobo de la raporto de la ĜA de BEF (19-an de marto 2016)**
4) **Financa Raporto.**
5) **Funkciado de BEF.**
6) **Informado pri la agadoj de FEL / APE / EBG / BEFA / ILEI / kaj Aliaj ...**
7) **Rilatoj kun UEA kaj EEU.**
8) **Verdaj Skoltoj**
9) **PEKO 2017**
10) **Eksteraj agadoj ,.....**
11) **Internaciaj agadoj.**
12) **Komitata malŝarĝo.**
13) **Administrantaro – Kandidatoj – Elektoj.**
14) **Diversaĵoj.**

La Sekretario
Claude GLADY

NB : Bonvolu informi ĉiujn interesatulojn… Dankon !
Ĉiuj samideanoj estos bonvenaj.

Flory : 059-702914 flory2@witdoeckt.be
Marcel : 071-431413 0476/201273 mardelforge@brutele.be
Eric : 02-3848223 ericbaert@skynet.be
Claude : 071-644916 0485/914659 cglady@arcadis.be

# ĜENERALA ASEMBLEO DE BEF

**Dato : Sabaton, 19-an de marto 2016. Je 13h30.. (Provizora raporto)**
**"Ferme du Château" (Centre ADEPS-BLOSO) Allée des Sports, 12 BE-6280 LOVERVAL**

**Ĉeestas 14 partoprenantoj : Flory WITDOECKT (BEF), Marcel DELFORGE (BEF), Claude GLADY (BEF), JANSSEN Nicky (FEL), Walter VAN DEN KIEBOOM (FEL), VERCAMMEN Ivo (FEL), DE BUYL J-M Nikolao (EBG), SPERBER Francine (EBG), Clara BRACKE (BEFA), SOSSOIS Georges (APE), Bernadette PONCELET (APE), DE MEYERE Hubert (APE), SPARENBERG Jean-Pol (APE-VS), Valère DOUMONT (APE-VS)**

**Senkulpiĝis : Eric BAERT (BEF), Marc CUFFEZ (FEL), DE VOS Philippe, DE KEYZER Hugo, VAN DER VLEUGEL Joseph, VILLERS Michèle, KUSTERS Ward, Katja LODOR, Hans DELNAT,**

**Prezidas: Flory WITDOECKT (Prezidantino). Marcel DELFORGE (Vicprezidanto).**
**Protokolas : Claude GLADY (Sekretario).**

**1) Flory unue deziras memorigi pri la ĵusa forpaso de Michael CWIK.**
**Nikolao, Francine kaj Clara, je la nomo de la Brusela Grupo, substrekas la gravajn kontribuojn de Michael en la Brusela sed ankau en la Ĝenerala Eo-Movado.**
**Plia informado pri Michael : https://eo.wikipedia.org/wiki/Michael_Cwik**

**2) La listo de laĉeestantoj cirkulas : 14 subskriboj.**

**3) Raporto de la pasinta ĜA de BEF (14/03/2015): Ĝi estas aprobita sen rimarko.**

**4) Kasista Raporto : Pro sia sanstato, Eric ne povas ĉeesti la kunvenon !**
**Sed li sendis raporton al Marcel : Se ni havas malmulte da mono (ĉ. 2000 €) ĉe nia kuranta konto BPOST, ni posedas pli en ŝparkapitalon (8000 + 3000 = 11000 €) ĉe UEA kja FEL, sed la totala rento depost la deponoj, ne estas tre granda (ĉ. 800 €).**
**Eric proponas ke oni trovas alian kasiston. Sed neniu proponas sian kandidatiĝon !**
**Tiam multaj proponas ke la sekretario ankaŭ reprenos la kasistan taskon aŭ almenaŭ helpos la laboron de Eric. Claude replikas ke laŭ li, ne estas bona ideo, konstante pluŝarĝi iun kiu estas jam multe okupita por Esperanto, ekzemple en APE. Li diras, ke estas nekompreneble, ke oni ne trovas iun por fariĝi kasisto de BEF en la "tuta" belga Eo-movado. Sed konstatante ke neniu alia estas kandidato, kaj konsiderante ke necesas trovi rapidan solvon por ŝajne ne tro peza laboro, Claude konsentas informiĝi kaj vidi kiel helpi Eric por la venonta Kasista Raporto.**

**5) Funkciado de BEF : BEF estas nur teoria kupolo por la tri memstaraj grupoj (FEL, EBG kaj APE). Ĝi estas tamen necesa ĉar ĝi estas la sola Asocio oficiale agnoskita por Belgio far UEA. Tiu defakta Asocio precipe pluvivas dank'al la Ĝeneralaj Asembleoj, kiuj permesas renkonton kaj interŝanĝojn de informoj inter la diversaj belgiaj Eo-grupoj.**
**Krom tio, la estraro de BEF malmulte intervenas en la agadoj de la grupoj. BEF posedas ankoraŭ iom da mono (Vidu supre). BEF konservas tiun monon, kiu permesas helpi agadon, ekzemple por la Verdaj Skoltoj aŭ la kursoj de BEFA laŭ la decidoj de pasintaj Ĝeneralaj Asembleoj.**

**6) Informado pri la grupaj agadoj.**
**FEL : Nicky informas ke FEL serĉas novan domon, por anstataŭigi Frankrijklei, ĉar la Institucio Hodler kiu posedas la domon volas repreni sian bienon.**
**Ivo informas pri la revuoj Horizontaal kaj Monato.**
**Okazos Beneluksa Kongreso en septembro en LIER.**

**APE : Bernadette kaj Marcel informas pri la aktualaj malfacilaĵoj de APE.**
**Ni ne plu posedas veran teamon por eldoni veran revuon "Esperanto en Marche",**
**sed Claude proponis sin por eldoni Informbultenon por ke la grupo konkrete pluvivas.**
**En 2015, aperis 4 numerojn de EeM. Claude promesas fari same en 2016.**
**Krom la papera versio, la bulteno estas elŝutebla ĉe nia retejo.**
**Hubert kaj Patrice Van de Velde plu mastrumas la retpaĝaron de APE.**
**Pliaj informoj ĉe :http://esperanto-wallonie.be/**
**Se estas kelkaj lokaj kaj personaj iniciatoj, ni devas bedaŭrinde konfesi ke, laù niaj informoj, nur la grupo de Marcinelle efektive funkcias, kun regulaj kursoj kaj prelegoj..**

**EBG : Nikolao prezentas la kursojn kiuj ekzistas en Bruselo je du niveloj.**
**EBG deziras trovi pli facilan kunvenejon, verŝajne en "De PianoFabriek" en Saint-Gilles ekde novembro. Efektive, ne plu estas eŭropaj komisionuloj en la Grupo kaj do ni ne scias ĉu estos eble resti en la ĝisnunaj eŭropaj lokoj.**
**Ni regule eldonas nian revuon "Aktuala".**
**La retejo plu funkcias : http://www.esperantobruselo.org/drupalo/eo**
**Okazas ankaŭ kelkaj "spagetaj babilejoj" lunde.**

**BEFA : Clara informas pri la konversacia Rondo en Dilbeek.**

**ILEI : Flory prezentas la raporton de Marc Cuffez pri la sukcesa Kongreso en Ostendo, kun ĉ. 200 partoprenantoj. Germain Pirlot intencas gvidi kursojn.**

**7) UEA : Nun ĉ. 315 belgaj individuaj membroj en FEL, EBG kaj APE, pagas kotizon al UEA pere de la konto de FEL (Gerd).**
**Flory proponas sin kiel komitatano A por UEA, klarigante la kondiĉojn.**
**Ĉar ne estas alia kandidato, Flory estas unuanime akceptita.**
**La Ĝenerala Direktoto Osmo Buller emeritiĝis ! Nun s-ino Veronika Poor estas elektita kiel nova Ĝ. D.**
**UEA intencas aĉeti novan loĝejon por la personoj kiuj laboras en UEA.**
**EEU ; Flory substrekas ke ne estas facile arigi la kotizojn por EEU far la landaj asocioj. Nun ni havas liston de la pagoj faritaj de ĉiuj landaj asocioj.**

**8) VERDAJ SKOLTOJ : Interveno de Valère kiu prezentas la agadojn de la Verdaj Skoltoj.**
**Pliaj informoj ĉe : https://verdajskoltoj.wordpress.com/**
**Flory instigis monsubteni la Verdajn Skoltojn. Sed ŝi konfesas, ke ŝi konstatis malmulte da rezultoj.**
**La Verdaj Skoltoj deziras scii ĉu ĉiuj reprezentantoj konsentas krei interasocian laborgrupon.**
**Necesus ekzemple kompleta listo de retadresoj. BEF konsentas kaj apogas.**

**9) PEKO 2016 en La Marlagne : Estas jam ĉ. 50 aliĝintoj !**

**10) Malŝarĝo de la estraro estas unuanime aprobita.**
**Neniu nova kandidato : la estraro plufunkcias sen ŝanĝo.**

**11) Diversaĵoj :**

**1) Pri la diversaj Zamenhoffestoj : multaj grupoj pene organizas propran ZF. Kaj ankaŭ, ne estas facile iri al ĉiuj, kelkfoje tre malproksimaj. Ĉu ne estus interese fari LA Z.F. en unu sola loka, ekzemple je nomo de BEF ? Evidente, Bruselo estas en centra loko, sed ni konstatis ke la Z.F. en Ostendo estis granda sukceso.**

**2) Estas peto por organizi la venonta Ĝenerala Asembleo de BEF en pli centra loko. Kaj ĉefe en pli facile atingebla loko por tiuj kiuj ne posedas veturilon. Estas ankaŭ peto por organizi ĝin alternative en la tri regionoj. Ekzemple en centra Bruselo, aŭ en Antverpeno en ĝia nova kunvenejo ?**

**Venonta ĜA de BEF : 18-an de marto 2017 en BRUSELO (Vidu la kunvokilon !).**

**La Sekretario Claude Glady**



**Ĝenerala Asembleo de BEF en LOVERVAL (19/03/2016)**



**Ĝenerala Asembleo de BEF en LOVERVAL (19/03/2016)**

# NI GAJE KANTU !

**EN FOJNAMASETO**
=================

(Ario :  « Auprès de ma blonde »)

Sen hejmo, sen monero,
Libera sub ĉiel'
Sen hejmo, sen monero,
Libera sub ĉiel'
Vagadas mi sur tero
Sen zorgo kaj sen cel'.

En fojnamaseto,
kiel bone, bone, bone
En fojnamaseto,
bone dormas mi !

Dumvintre falas neĝo
Somere brilas sun ',
Dumvintre falas neĝo
Somere brilas sun '
Feliĉa kiel reĝo,
Mi vagas sub la lun'.
Refreno
Por mi blovetas vento,
Ondumas riveret',
Por mi blovetas vento,
Ondumas riveret'
Por mi odoras mento,
Ruĝiĝas  papavet'.
Refreno
Pli riĉa ol riĉulo,
Ne timas ŝtelon mi,
Pli riĉa ol riĉulo,
Ne timas ŝtelon mi,
Trezor' de vagemulo,
Valoras nur por li !

Refreno....

+++++++++++++++++++++++++

**AL LA FONTANO KLARA**
=====================

(Ario : « A la claire fontaine »)

Al la fontano klara,
Iris mi en pilgrim'.
Estis ĝi tiel pura,
ke jen mi banis min !

Ni jam de longe vin amas,
Ne plu mi forgesos vin !

Sub foliar' de kverko,
Tuj mi sekigis min;
Sur la plej alta branĉo,
Kantis najtingalin'.

Refreno

Kantu, birdeto, kantu,
Gajas al vi l'anim';
Mia ne estas amo,
Petro forlasis min.

Refreno

Ĉar mi al li  rifuzis,
Rozon pro amatin';
Se nur la rozo estus,
Plu en rozuja sin'.

Refreno

Se nur la rozo estus
Plu en rozuja sin';
Kaj se l'amiko kara,
Amus ankoraŭ min !

Refreno
++++++++++++++++++

# Avec Germain PIRLOT, notre collaborateur pour l’Espéranto : « Des profs motivés qui souhaitent communiquer leur passion ! »

**Créée en 1949, l'ILEI *(Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)*, ou « *Ligue Internationale des Enseignants Espérantistes* », a son siège juridique à Rotterdam, Pays-Bas.**

**Elle est dirigée par un comité exécutif composé de 7 membres élus pour un mandat de trois ans.**

**L'actuelle présidente Mireille Grosjean, domiciliée en Suisse, est secondée par des représentants d'Afrique du Sud, du Brésil, de Chine, des Etats-Unis, de Russie et de Serbie.**

**Le conseil d'administration se réunit physiquement une fois par an, lors d'une conférence, et prend des décisions au cours de l'année grâce à un système de vote par Internet.**
**Les sections nationales d'ILEI élisent des représentants au conseil d'administration selon un système proportionnel; au 5 juin 2016 il y avait 60 membres au conseil d'administration qui représentent 39 sections nationales.**

**Actuellement l'ILEI a des sections nationales dans 39 pays, des représentants dans 12 et des contacts personnels dans plusieurs autres.**

## Ses buts

### Ses principaux objectifs sont:

- **introduire l'espéranto dans les écoles;**
- **enseigner de manière efficace la langue à tous niveaux et par différents médias ;**
- **explorer et résoudre les problèmes pédagogiques en lien avec l'enseignement de l'espéranto;**
- **publier des manuels modernes, des revues spécialisées, des livres et des dépliants informatifs;**
- **organiser des évènements internationaux : conférences, séminaires, etc.**
- **s'occuper d'examens internationaux sanctionnant les aptitudes d'application et d'enseignement de l'espéranto;**
- **prendre contact avec des instances reconnues dans l'éducation et avec d'autres organisations dont les objectifs sont conformes à ceux de la ligue;**
- **organiser et rendre efficaces les sites internet et listes de diffusion.**
- **Partenariat avec des organismes non-espêrantistes.**

**L'ILEI est reconnue comme «organisation non-gouvernementale en qualité d'observateur» auprès de l'ONU et de l'UNESCO. Elle est aussi partenaire de la FIPLV** *(Fédération Internationale des Professeurs de Langues Vivantes),* **ainsi que d'ALTE** *(Association of Language Testers in Europe / Association des Centres d'Evaluation en Langues en Europe).*

**Chaque année un congrès d'une semaine de l'ILEI est organisé dans un pays différent. En 2015 il s'est tenu à Oostende, Belgique, du 17 au 25 juillet avec la participation de 170 personnes de 34 pays; en 2016 ce fut à Nyiregyhaza, Hongrie, du 23 au 30 juillet avec 130 personnes de 28 pays; en 2017 ce sera le tour de la Corée du Sud du 15 au 22 juillet à Busan.**

**Elle collabore également avec d'autres partenaires espérantistes, tels l'EEU.(Union Européenne Espérantiste), l'E@I (Education par internet), TEJO (Organisation mondiale des jeunes espérantistes), l'ICH (Centre interculturel de Herzberg, Allemagne), sans oublier l'UEA (Association universelle d'espéranto).**

## Publications

**L'ILEI édite deux revues:**

- **l'** *Internacia Pedagogia Revuo* **, trimestriel d'une quarantaine de pages à l'inten tion des enseignants;**
  **voir spécimen : http://www.ilei.info/iprlIpr114rete.pdf**
- *[una Amiko* **pour les élèves et les débutants, avec un vocabulaire de base limité à 1.500 mots;**
  **voir spécimen: http://www.ilei.info/revuoillunaAmik02 2013reta.pdf**

**Ses activités :**

**Elle organise des cours d'espéranto et des sessions d'examens lors de grandes activités espérantistes qui ont lieu de par le monde; l'on peut consulter une liste non-exhaustive pour 2016-17 sur le site** *http://* **www.eventoj.hu/kalendaro.htm.**

**Chaque année un congrès d'une semaine de l'ILEI est organisé dans un pays différent. En 2015 il s'est tenu à Oostende, Belgique, du 17 au 25 juillet avec la participation de 170 personnes de 34 pays; en 2016 ce fut à Nyiregyhaza, Hongrie, du 23 au 30 juillet avec 130 personnes de 28 pays; en 2017 ce sera le tour de la Corée du Sud du 15 au 22 juillet à Busan.**

**En novembre de cette année (11-12) l'ILEI collabora au colloque scientifique international** *"Espéranto- Pont entre des langues et des cultures"* **organisé à Timisoara avec deux langues de travail: l'espéranto et le roumain. Ce même mois se déroula le Se Séminaire de l'ILEI en Asie Orientale sous la direction du Prof. Dr. GONG Xiaofeng, vice-président de la Ligue, au cours duquel des examens furent organisés.**

## Examens

**Depuis 2008, les sessions d'examens organisées par l'ILEI sont dénommées *KER-ekzameno (Komuna Eûropa Referenco - Référence Commune Européenne)* pour respecter le CECR (Cadre Européen Commun de Référence). Le fait que le nouvel examen se base sur les normes européennes signifie que les attestations sont officiellement reconnues et considérées comme les autres diplômes d'examens linguistiques accrédités par ALTE. Cette attestation, document officiel, est rédigée en 4 langues: espéranto, allemand, anglais, français.**
**L'accréditation et la mise en fonction de ce système est le résultat d'une collaboration avec le Centre national d'examens linguistiques de Budapest, Hongrie, où l'espéranto est repris avec les mêmes droits que les langues étrangères reconnues par l'Etat. Chaque année quelques milliers de candidats se présentent à cet examen.**

## Divers

**En Pologne, l'Université Adam Mickiewicz à Poznan dispose d'un programme d'interlinguistique et d'un programme de formation pédagogique qui prépare à l'enseignement de l'espéranto; selon le niveau recherché, ces cours sont répartis sur 1 ou 3 ans, avec la participation d'étudiants étrangers, vu que les travaux sont organisés sur la toile entre des semaines d'étude intensive à l'Institut de Linguistique.**
**Pour plus d'informations, en espéranto et en anglais:**

***http://* www.staff.amu.edu.pl/-interl/interlingvistiko lindex.html**

**En Grande-Bretagne, le projet "Springboard" vise à promouvoir l'enseignement de l'espéranto dans les écoles primaires:**
**www.springboard21anguages.org.**

**Les efforts de la Ligue permettent à des enfants de divers pays d'entrer en contact avec d'autres jeunes et de découvrir d'autres cultures par l'usage d'une langue commune. Plusieurs projets ont été réalisés dans le cadre des programmes européens Comenius et Grundtvig. Comme par exemple ce programme « *Diversité culturelle et multilinguisme en Europe*» réalisé de janvier 2013 à mai 2015 par le Centre d'Education Interculturelle à Nowy Sacz, Pologne; la Fondation « Education.net » à La Haye, Pays-Bas; le Centre Interculturel à Herzberg, Allemagne; l'Association Culturelle d'Espéranto à Budapest, Hongrie.**

**Par ailleurs, en collaboration avec l'ILEI, la Maison Culturelle de Grésillon, France (http://gresillon.orgl) organise des stages pour des personnes qui ont commencé l'apprentissage de l'espéranto et qui désirent faire de rapides progrès grâce à des cours intensifs animés par des enseignants expérimentés de différents pays qui utilisent la méthode directe, uniquement en espéranto, pour un apprentissage intensifs. Le programme des cours et examens pour le printemps 2017 peut être consulté en français sur le site**

**http://gresillon.org/spip.php?rubrique20&lang=fr.**

**G. *Pirlot***

# Printempa Esperanto-Kunveno 2017 (PEKO)

**PEKO** estas LA okazo por esperantigi viajn amikojn kaj familianoj.
NEPRE invitu viajn amikojn, genevojn, genepojn, najbarojn, E-lernantojn…

**Kiam?** De vendredo la 24a de marto je la 18a ĝis dimanĉo la 26a de marto.

**Kie?** Centre Protestant d'Amougies Verte Voie, 16 BE- 7750 Amougies

Amougies estas meze de la "Lando de la Montetoj". Unu el la plej belaj naturparkoj de Valonio. Ĝi estas geografie sama regiono kiel "Flandraj Ardenoj" certe la plej bela naturparko de Flandrio dank'al tiuj ĉarmaj montetoj.
La centro estas en bela parko kun ludoj por infanoj kaj loko por fajro.
En la ĉefa konstruaĵo estas 12 kvar-litaj ĉambroj kun lavujo. Necesejoj kaj duŝoj estas apartaj. En la dua konstruaĵo (je 20 metroj) estas 10 du-litaj ĉambroj sen lavujo.

## Programo

Tiel kiel por la antaŭaj PEKOj ni preparas ampleksan kaj mojosan programon: Esperanto-kursoj diversnivelaj, fotografia seminario, bierfarado, diskoteko, promenadoj, ekskursoj, prelegoj, manlaborado por infanoj (kaj aliaj), libroservo de FEL…
Dum PEKO okazos Eramus+ seminario kunlabore kun TEJO kun la temo "Al-ekstera Komunikado"

## Kotizoj

Via aliĝo validas post antaŭpago de 50€ je la konto de la Verdaj Skoltoj.
Por aliĝi post la 9a de marto, bonvolu telefoni al Valère +32 485 517 552

**PLENTEMPA PARTOPRENADO**

| Aliĝo ĝis la | 1a februaro | 9a marto |
|---|---|---|
| Bebo | 0€ | |
| Ĝis 13 jaroj | 60€ | |
| Ĝis 25 jaroj | 99€ | 110€ |
| Ekde 26 jaroj | 99€ | 125€ |
| Verdaj Skoltoj | 30€ | |
| NEJ-anoj | 75€ | |

(aĝo je la komenco de la kunveno)

**UNUTAGA PARTOPRENADO**

Kun programo kaj manĝoj:

- ĝis 18 jaroj : 10€
- ekde 18 jaroj: 40€

Ni ofertas senpagan partoprenadon al la 10 unuaj adoleskuloj-kiuj-neniam-partoprenis-E-eventon!

rabato por familio, kontaktu nin!

La kotizo inkluzivas : loĝadon, manĝojn, teon kaj kafon, programerojn, ekskursojn kaj taksi-servon (laŭ nia ebloj).
- bebo venas kun propra lito kaj manĝoj
- krompago por unupersona ĉambro: 50€
- krompago por dupersona ĉambro : 50€ por persono

**Kiel aliĝi ?** Plenigante tiun formularon https://goo.gl/forms/lPAnuxb6EqAlCl4g2
Aŭ telefone al Valère +32 485 517 552

**Pago :** Bonvolu ĝiri vian kotizon sur la bankkonto de la Verdaj Skoltoj:
- ArgentaNomo: Verdaj Skoltoj IBAN BE25 9731 2584 2982 BIC ARSPBE 22 ruelle de Thuin 20 BE- 6540 Lobbes Belgujo
- ĉe UEA aŭ FEL La konto de la Verdaj Skoltoj ĉe UEA kaj FEL estas vsko-n

# ELEMENTAJ PRINCIPOJ DE MILITISTA PROPAGANDO

## Uzeblaj dum « malvarma », « varma » aŭ « varmeta » milito

**[ Verkis : Anne Morelli (Profesoro en la Brusela Universitato ULB) ]**
***Tradukita el la franca.***

**1. NI NE DEZIRAS MILITON !**
**La ŝtatestroj de ĉiuj landoj preamble kaj solene ĉiam asertas, ke ili ne deziras la militon.**

**2. LA ALIA FLANKO SOLE RESPONSAS PRI MILITO !**
**Ni estis devigitaj fari militon, la kontraŭa flanko ekkomencis, ni devige reagas, pro necesa sindefendo, aŭ por plenumi niajn internaciajn kontraktojn.**

**3. LA MALAMIKO HAVAS LA VIZAĜON DE LA DIABLO (La « deĵorata forpuŝulo »)**
**Oni ni povas hati tutan homan grupon kaj do necesas personigi la malamikan flankon pere de ĝia estro (Tio abomeninda timigilo maskos la diversecon de la popolo, kiun li estras).**

**4. KAŬZON NOBLAN NI DEFENDAS, KAJ NE PROPRAJN INTERESOJN !**
**La militistaj instigiloj (Deziro de geopolitika regado apogitaj de ekonomiaj motivoj) estas nekonfesebla al la publika opinio.**

**5. LA MALAMIKO KONSCIE PROVOKAS KRUELAĴOJN ;**
**SE NI FARAS MISAGOJN, ESTAS NEVOLEME !**
**Milito estas prezentita kiel konflikto inter civilizacio kaj barbareco., la malamika armeo precipe konsistas el rabistoj sen fido kaj sen leĝo.**

**6. LA MALAMIKO UZAS NE PERMESATAJN ARMILOJN.**
**Ni ne faras kruelaĵojn kaj ni faras militon kavalirece, respektante la regulojn. Tio ne estas vere ĉe la malamikaj soldatoj**

**7. NI SUFERAS MALMULTE DA PEREOJ, TIUJ DE LA MALAMIKO ESTAS EGAJ !**
**La konsento de la publika opinio dependas de la videblaj rezultoj de la konflikto.**

**8. LA ARTISTOJ KAJ LA INTEKEKTULOJ SUBTENAS NIAN KAŬZON !**
**Por la propagando, necesas partoprenado de reklamprofesiuloj, aŭ de artistoj kaj de intelektuloj, profesie trejnitaj por krei emociigon.**


**9. NIA KAŬZO HAVAS KARAKTERON SANKTAN !**
**Se nia kaŭzo estas sankta, ni devas defendi ĝin, eĉ, se necese, uzante armilojn kaj se ĝi posedas religian karakteron, estas kruzado por kio ne estas eble eskapi.**

**10. TIUJ KIUJ ESPRIMAS DUBON PRI TIU PROPAGANDO ESTAS PERFIDULOJ !**
**Dum la konflikto, nenio rajtas demandi kial la milito aŭ pronoci sen perfido la vorton « PACO »**

*****************************

**Rim : La « deĵorata forpuŝulo » ? franca esprimo :« L'affreux de service »**

# PREPOSITIONS



| | | |
|---|---|---|
| AL : | vers | iri al Bruselo |
| ĜIS : | jusqu'à | ĝis la revido |
| EL : | hors de | el la urbo |
| DE : | venant de | de fremdlando |
| PRETER : | le long de | preter la rivero |
| TRA : | à travers | tra la muro |
| TRANS : | au delà de | trans la landlimo |
| DUM : | pendant | dum unu jaro |
| EN : | dans | en la kesto |
| EKSTER : | hors de | ekster la lando |
| SUR : | sur | salti sur la lito |
| SUR .....-N : | de.. sur | salti sur la liton |
| SUPER : | au dessus | super la turo |
| SUB : | sous | sub la planko |
| INTER : | entre | inter du baroj |
| APUD : | auprès de | apud mia najbaro |
| ĈE : | à côté de | ĉe mia patro |
| KUN : | avec | kun mia amiko |
| SEN : | sans | sen mia fratino |
| ANTAŬ : | devant | antaŭ nia erao |
| ĈIRKAŬ : | proche de | ĉirkaŭ la urbo |
| POST : | après | post la starto |
| POR : | pour | por la paco |
| KONTRAŬ : | contre | kontraŭ la milito |
| FOR : | loin de | for mia hejmo |

| | | |
|---|---|---|
| PRI | : au sujet de | : pri via teksto |
| LAŬ | : selon | : laŭ via diro |
| PER | : au moyen de | : per viaj manoj |
| PRO | : à cause de | : pro via rezulto |
| DA | : de (quantitatif) | : iom da salo |
| DANK'AL | : grâce à.. | : dank'al via helpo. |

FAR :( fait par..) ex : la manĝado de la muso far la kato.

JE (préposition passe partout) : Je la kvara horo : à quatre heure.

Je via sano : à votre santé.

N°39 - 4ème trimestre 2016

Plombières MAGAZINE

Tout ce qui bouge dans votre commune !

## L'ESPERANTO ?

**Comment des jeunes de 11 à 18 ans en provenance des Flandres, de Bruxelles, de Wallonie, de France, des Pays-Bas, d'Allemagne ou encore du Liban peuvent-ils se comprendre et faire des activités « scouts » ensemble ?**

Grâce à l'ESPERANTO !!
Langue qu'ils aprennent tous durant leurs activités. Ils ont commencé leur camp volant à bicyclette le 21 août 2016 à Plombières d'où ils sont partis le 23 afin de visiter le Musée de la Gueule à La Calamine qui contient une salle consacrée à l'Esperanto. Ensuite, route vers Zutendaal et enfin la banlieue d'Anvers en logeant sous tente chez d'autres espérantistes. Quand la troupe est au complet, d'autres jeunes viennent encore gonfler les rangs provenant du Grand Duché de Luxembourg, de Suisse, d'Espagne,...
Les Verdaj Skoltoj (scouts verts) se réunissent à raison de 7 week-ends par an et font un camp d'été de 8 à 10 jours.
Ils y aprennent aussi la tolérance, la fraternité et le respect d'autrui (les fondements de cette langue ne tiennent pas compte d'avis politiques, d'orientations religieuses ni philosophiques).
Contact et infos : info@verdajskoltoj.net
www.verdajskoltoj.net

**Intéressé par la langue ?**
**Venez la découvrir !**
Bernadette PONCELET
Rue Windt 103
4850 PLOMBIERES
087/398570
bernadetteponcelet@skynet.be




PUBLIVIRE PUBLIFLOR
62e ANNEE / MERCREDI 16 NOVEMBRE 2016 / NUMERO 42
Editions Michel frères sprl - 2, rue
Tél. 063/57.71.66 - Fax

ESPERANTO — Anecdotes sur CONFUCIUS



**九十八、西狩獲麟**

哀公十四年，魯國打獵時打死一只怪獸。孔子認定爲麒麟，哭泣着說：仁德的麒麟出現而被殺害，恐怕我一生所追求的理想要到此爲止了。



## 98- La unukornulo ĉasita en okcidento

En la dekkvara jaro de la duko Ai de Lu-regno, ĉasistoj de Lu-regno ĉasis strangan beston. Neniu sciis, kia besto ĝi estas. Ili do kunportis tiun strangan beston ĝis antaŭ Konfuceon, kaj petis lin identigi ĝin. Konfuceo rekonis tiun beston kaj diris, ke ĝi estas unukornulo. Poste Konfuceo ploris kaj diris : « *Unukornulo estas utila kaj bona besto. Tiu besto estas simbolo de bonkoro kaj virto. Nun ĝi aperis kaj estis mortigita. Eble tio prognozas, ke la idealo, kiun mi klopodadis realigi dum mia tuta vivo, malaperos.* »

**<u>Informbulteno eldonita po 17000 ekzempleroj.</u>**

Pour informations complémentaires : GaumEspéranto
Rue P. Louis, 1 - 6762 SAINT-MARD - 063 57 12 04

# INFORMOJ PRI ESPERANTO

## BELGA ESPERANTO FEDERACIO (BEF)

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Prezidantino :** | S-ino Flory WITDOECKT (Oostende) | 059 702 914 | flory2@witdoeckt.be |
| **Sekretario** : | S-ro Claude GLADY (Cerfontaine) | 071 644 916 | cglady@arcadis.be |
| **Kasisto** | S-ro Eric BAERT (Braine L'Alleud) | 02 384 82 23 | baert.eric@skynet.be |

**BEF (Defakta Asocio) estas kupola federacio, agnoskita far UEA, por la tri belgiaj regionaj grupoj : APE, FEL, EBG.**

## ASOCIO POR ESPERANTO (APE) Asbl

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Honora Prezidanto** : | Marcelle DELFORGE | 071 431 413 | mardelforge@brutele.be |
| **Prezidanto** : | Georges SOSSOIS | 071 436 205 | georges.sossois@gmail.com |
| **Sekretariino** : | Bernadette PONCELET | 087 398 570 | bernadetteponcelet@skynet.be |
| **Kasisto** : | Claude GLADY | 071 644 913 | cglady@arcadis.be |
| **Eventoj** : | Valère DOUMONT | 0485 517 552 | doumontvalere@yahoo.fr |
| **Promocio Eo** : | Hubert DEMEYERE | 071 502 691 | hubert.demeyere@gmail.com |
| **Interreto** : | Patrice VAN DE VELDE | 0478 251 419 | patrice.vdvelde@gmx.com |
| **Disvastigado** : | Guy BASYN | 010 688 282 | guy.basyn@skynet.be |

## FLANDRIO : FLANDRA ESPERANTO LIGO (FEL) vzw

Lange Beeldekensstraat 169 (2060 Antwerpen) 03 234 34 00
info@fel.esperanto.be www.esperanto.be

FEL eldonas la paperan revuon « HORIZONTAAL » kaj la retan « VERTIKALE ».

## BRUSELO : ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO (EBG) asbl/vzw

| | | | |
|---|---|---|---|
| Françoise PELLEGRIN | (Rhode-St-Gebèse) | 02 358 27 28 | franaz@esperantobruselo.org |
| Nikolao de BUYL | (Koekelbergh) | 0478 382 981 | nikolao@esperantobruselo.org |
| Laurent LOISSE | sekretario@esperantobruselo.org | | www.espernantobruselo.org |

La Grupo eldonas la revuon « AKTUALA » : https://sites.google.com/site/ebgaktuala/

## VERDAJ SKOLTOJ asbl.

**[www.verdajskoltoj.net]** **info@verdajskoltoj.net**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Jean-Pol SPARENBERG | Prezidanto | 0475/27 23 19 | jpsparenberg@gmail.com |
| Valère DOUMONT | Sekretario | 0485/51 75 52 | doumontvalere@yahoo.fr |

Subteno al konto de V.S. : **BE25 9731 2584 2982** Ruelle de Thuin 20 B-6540 LOBBES

## GROUPE DES CHEMINOTS : FERVOJISTOJ (BEFA)

Lucien DE SUTTER (BXL-Central) 058 501 825
Cours : 1er et 3ème mercredi, chaque mois de 13h30 à 16h00

***INTERNACIAJ ORGANIZAĴOJ - ORGANISATIONS INTERNATIONALES***

| | | | |
|---|---|---|---|
| **UEA :** Nieuwe Binnenweg 176 | NL-ROTTERDAM | +31 10 436 1044 | www.uea.org |
| **SAT :** Av. Gambetta, 67 | FR-75020 PARIS | +33 9 50 71 01 97 | www.satesperanto.org |
| **SAT-AMIKARO :** Bd Vincent Auriol, 132 | FR-75013 PARIS | +33 9 53 50 99 58 | www.esperanto-sat.info/ |

Ĉiuj informoj (en franclingva Belgio por UEA) ĉe la peranto Claude GLADY :
rue du CULOT, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916 cglady@arcadis.be

# INFORMOJ PRI ESPERANTO EN VALONIO

## CHARLEROI : KARLOREĜA GRUPO ESPERANTISTA (K.G.E)

| | | | |
|---|---|---|---|
| Rudy COGNIAU | (Châtelet) | 0492 710 974 | |
| Mireille MARNETTE | (Marcinelle) | 071 324 733 | marnette.mireille@skynet.be |

## LIEGE-ESPERANTO asbl

| | | | |
|---|---|---|---|
| Denise MAILLET | (Embourg) | 04 365 15 23 | denise.dupont@skynet.be |

## LOUVAIN-LA-NEUVE : « KVINFOLIO » asbl

| | | | |
|---|---|---|---|
| André DEMARQUE | (Wavre) | 0486 516 085 | ademarque@skynet.be |

## VIRTON : GAUME ESPERANTO

| | | |
|---|---|---|
| Gaby SIMEON | (Saint-Mard) | 063 571 204 |

## SENLIME + VERVIERS (V.E.G)

| | | | |
|---|---|---|---|
| Jean-Marie JACQUES | (Verviers) | 087 330 292 | jacques@senlime.org |
| Jose JACOB | (Polleur) | 087 221 079 | |

## KELMIS (LA CALAMINE) : « AMIKEJO »

| | | |
|---|---|---|
| Mathieu SCHRYMECKER | (La Calamine) | 087 853 389 |

## AUTRES VILLES WALLONNES - ALIAJ VALONAJ URBOJ

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| **ATH** | Monique VAN ROY | (Ellezelles) | 068 542728 | |
| **BINCHE** | Maxime LECHIEN | (Vellereille) | 064 337 826 | |
| **CERFONTAINE** | Claude GLADY | (Cerfontaine) | 071/644 916 | cglady@arcadis.be |
| **COMINES** | J-C THUMERELLE | (Warneton) | 056 557 606 | jcthum@gmail.com |
| **GEMBLOUX** | José VINCK | (Gembloux) | 081 613 016 | |
| **MONS** | Edith COLAS | (Saint-Symphorien) | 065 313263 | |
| **THUIN** | Jean-Pol SPARENBERG | (Lobbes) | 0475/272319 | jpsparenberg@gmail.com |

## RETPAĜO - SITE INTERNET D'APE :

http://esperanto-wallonie.be/

**Respondeculoj** : <patrice.vdvelde@gmx.com> k <hubert.demeyere@gmail.com>

Por konsulti aŭ elŝulti ĉiujn lastajn Bultenojn EeM en formato A4 kaj pdf :

http://esperanto-wallonie.be/eo/esperanto-en-marche-eo

## BIBLIOTHEQUE D'APE - BIBLIOTEKO

**Respondeculo : Claude GLADY [Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916]**

Vi povas mendi librojn al la RETBUTIKO DE FEL : http://www.esperanto.be/fel/but/ls_serchu.php

## ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO (A.P.E.)

**COTISATIONS POUR APE EN 2017**

- **MEM : Pour être membre de APE : 10 €**
- **BUL : Pour recevoir les bulletins d'informations : 7 €**
- **FAM : Membre supplémentaire de la famille : 3 €**

**VIREMENT AU COMPTE IBAN : BE72 000 3258537 16 BIC: BPOTBEB1**
**de l'Association pour l'Espéranto (APE).**

**NB: Indiquer les raisons du versement. Exemple : MEM+BUL+2xFAM : 23 €**

## ABONNEMENT A LA REVUE « ESPERANTO-INFO » : 30 €

**Vous pouvez payer directement au compte d'« ESPERANTO-INFO » (conseillé !)**
**Virement européen au compte IBAN: FR91 2004 1010 0811 9014 6B02 947**
**Indiquer : « NOM PRENOM pour Esperanto-Info adresse »**
**Vous pouvez aussi passer par le compte d'APE avec la mention « EoInfo »**

| Kodo | Universala Esperanto Asocio: UEA 2017 | | Ricevas |
|---|---|---|---|
| SA | Abono al la revuo "ESPERANTO" de UEA. | 41 € | Revuon "ESPERANTO" sen membreco ! |
| Kto | Abono al "KONTAKTO". | 25 € | Revuon "KONTAKTO" |
| MJ | Membro UEA + "Jarlibro" | 26 € | "JARLIBRON" |
| MJ-T | Membro kun Jarlibro ĝis 29 jaro inkl. | 26 € | Revuon "KONTAKTO" kaj "JARLIBRO" |
| MA | Membro Abonanto (MJ + SA) | 64 € | Revuon "ESPERANTO" kaj "JARLIBRO" |
| MA-T | Membro Abonanto ĝis 29 jaro inkl. | 64 € | Kiel MA plus "KONTAKTO" |
| MG | Membro UEA+"Gvidlibro" | 11 € | "GVIDLIBRO" |
| PT | Patrono de TEJO | 78 € | la revuon "KONTAKTO" subteno al TEJO sen membreco |
| SZ | Societo Zamenhof | 128 € | Mecenata subteno sen membreco. |
| DM | Dumviva membro de UEA (25xMA) | 1.600 € | Dumviva MA |

**Bonvolu pagi al la konto de la peranto**
**por UEA-kotizoj en franclingva Belgio :**

**BE50 750-6373051-18**

**je la nomo de :**
GLADY Claude Rue du Culot, 1
B-5630 CERFONTAINE

UZU LA KUNMETITAN ĜIRILON

**BN: La "JARLIBRO" de UEA enhavas informojn kaj milojn da adresoj de UEA…**

**La "GVIDLIBRO" estas la "Jarlibro" sed sen la adresoj !**

**"KONTAKTO" estas la revuo de la junulara sekcio de UEA : TEJO**

**BN : Bonvolu nepre motivi vian ĝirilon per kodoj :**
**Ekzemple : MJ aŭ MA+Kto**